



# LA DEKSEPA

Organe Mensuel Espérantiste.

---

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : **H. de COPPET**  
**179, Boulevard Pereire, Paris.**

ABONNEMENT : *France, 1 franc. — Etranger, 1 fr. 50* par an.  
 Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :

Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

---

## Grupo Fundamentista « La Dek-Sepa ».

Groupe Espérantiste du XVII<sup>e</sup> Arrondissement de Paris.

SIÈGE SOCIAL : 179, Boulevard Pereire, Paris.

### Prochaines Causeries.

- 4 Mars. — Bourbonnais, Berry, Sologne, par M. Robert Bollack. 57 projections du Touring-Club de France.
- 11 Mars. — Réunion mensuelle des Groupes indépendants. — **Conférence de M. Rollet de l'Isle**, président de la S. F. P. E., membre d'honneur du Groupe : *La catastrophe de la Martinique en 1902* (Projections).
- 18 Mars. — Discussion publique ouverte par Mesdemoiselles Gauthier et Talvat : La mode.
- 25 Mars. — *Soirée récréative Artistique et Dansante.* — Vestiaire 0 fr. 50 par personne.
- 1<sup>er</sup> Avril. — Les environs de Paris. Des rives de la Seine à la plaine de la Beauce, par M. Gilbert Daniel. — 60 projections du Touring-Club de France.

*Le secrétaire,*

**ROBERT BOLLACK.**

## GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

---

Depuis Janvier 1914 les réunions de notre Groupe ont lieu tous les Mercredis, à 21 h., **SALLE VILLIERS, 64, rue du Rocher, à Paris (Métro: Villiers, Europe ou Saint-Lazare), dans un local particulier au 5<sup>e</sup> étage. — Ascenseur. — Téléphone : Wagram 81-54.**

**Tous les Mercredis causeries ou discussions en Esperanto, jeux, musique.**

Tous les Espérantistes y sont cordialement invités.

---

## L'Esperanto à Paris et dans la Banlieue

---

Une nouvelle revue mensuelle « Esperanta Revuo pri Komerco kaj Industrio », vient de paraître. Administration : 7, Boulevard Rochechouart, Paris. Abonnement annuel : 5 francs.



La prochaine réunion des Groupes indépendants aura lieu le Mercredi 11 Mars 1914, à 21 heures, au siège de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », 64, rue du Rocher, Paris.



Le Conseil Municipal de Paris a accordé une subvention de 1000 francs et le Conseil général de la Seine une subvention de 500 francs au Comité d'Organisation du Dixième Congrès d'Esperanto.



Le Groupe Espérantiste du Canton de Charenton organise, le Dimanche 15 Mars 1914, une visite de l'Ecole vétérinaire d'Alfort, sous la direction d'un professeur de l'Ecole. Rendez-vous à 9 h. 15 du matin devant l'Ecole.

Moyens de communication : Bateaux Parisiens et Trams-ways Bonneuil-Concorde, Louvre-Charenton-Créteil, etc.

---

# Dixième Congrès Universel d'Esperanto

Paris — 2-10 Août 1914

---

Le Congrès aura lieu dans le « Gaumont-Palace », rue Caulaincourt - place Clichy.


La carte du Congrès coûte 15 francs et 25 francs pour les personnes qui s'inscriront après le 1<sup>er</sup> Juin 1914. La femme et les enfants d'un congressiste paieront par personne 10 francs ou 20 francs après le 1<sup>er</sup> Juin 1914. Ces derniers congressistes n'auront pas droit aux documents du Congrès.

Les adhésions sont reçues tous les Mercredis soir aux réunions de la « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », Salle Villiers, 64, rue du Rocher, Paris.

\* \* \*

Dek-Sepanoj aliĝu ! Per via tuja aliĝo vi montros vian firman deziron sukcesigi tiun internacian festaron !

Vivu la Dekaaa ! ! !



## BIBLIOGRAFIO

---

**Esperantista Poŝkalendaro 1914.** — Ader kaj Borel, Dresden A-1. Prezo : fr. 1,00 (o Sm. 400).


Tre utila, bone presita, zorge ellaborita estas tiu poŝkalendaro, kiu entenas interesajn sciigojn pri nia movado kaj speciale en la germanlingvaj landoj.

Tamen, kun bedaŭro ni konstatas sur la paĝo 63-a, la sufikson **oz**, kiu estas maloficiala kaj senutila. Ni esperas, ke tiu sufikso malaperos en la proksima eldono.

Krom tio, ni rekomendas la poŝkalendaron.

ROBERT BOLLACK.





## La personeroj de Lambinet

De H. Meilhac kaj Lud. Halévy.

Komedieto en unu akto, ludita ĉe unu el la festoj de « La Dek-Sepa ».

### PERSONOJ

*Lambinet*, urbana burĝo.  
*Josefo*, servisto.  
*Gustavo Bricard*, fianĉino.  
*Berluron*, amiko de S-ro Lambinet.  
*S-ino Lambinet*, dommastrino.  
*Margareto*, ŝia filino.  
*Fanĉeto*, servistino.

### UNUA SCENO

S-INO LAMBINET, MARGARETO, LAMBINET, FANĈETO.

*Fanĉeto sidanta apud tableto, purigas argentaĵon. S-ro Lambinet, helpata de Margareto, sangas la kurtenetojn de la fenestro. Lambinet forprenas la tegilojn de la seĝoj kaj seĝegoj.*

LAMBINET. — Fanĉeto, necese estos, ke vi brosu la apogseĝojn, ĉar malgraŭ la tegiloj....

FANĈETO. — Mi, ke mi brosu la apogseĝojn? sed sinjoro, mi neniam havos la tempon.

LAMBINET (*ekkaptante la broson*). — Bone, bone, mi mem brosos ilin (*li ekbrosas*).

MARGARETO (*kun kurteneto en mano*). — Tiamaniere, paĉjo, li alvenis Parizon.....?

LAMBINET. — Jes, filino, Berluron, ĵus venis sciigi tion al mi.

MARGARETO. — Kaj S-ro Berluron kompreneble parolis al ci pri li.

LAMBINET. — Tute ne. Berluron devis rapidi.... Li nur diris al mi, ke tiu interesplena junulo estos tie ĉi dum la tago.

S-ino LAMBINET. — Pasigu al mi la kurteneton, Margareto.

MARGARETO (*transdonante ĝin al ŝi*). — Jen, panjo, jen! (*Al Lambinet*) Kaj ĉi kredas, ke mi lin amos?

LAMBINET. — Pri tio mi estas certa; mi kolektis informojn pri li; bonegaj ili estas, honesta, agema, inteligenta.... nepra estonta sukceso en la elastaj matracoj, kiujn li fabrikas. (*Li donas la broson al Margareto, kiu demetas ĝin sur la maldekstran apogseĝon.*)

MARGARETO. — Efektive, estas jam multe, sed tio ne sufiĉas.

LAMBINET (*al Fanĉeto*). — Ĉu vi iris ĉe Ĉevet, pri la perdrikidoj?

FANĈETO. — Ne ĝis nun, sinjoro.

LAMBINET. — Kial ne ĝis nun?

FANĈETO. — Mi havis tro multe por fari. Nun, ankoraŭ necese estas, ke mi purigu arĝentajon, kaj poste, ke mi okupiĝu pri la vespermanĝo.

LAMBINET. — Tamen, necese estas, ke oni iru ĉe Ĉevet.

FANĈETO. — Nu, iru mem.

LAMBINET. — Fraŭlino Fanĉeto....

FANĈETO (*levigante*). — Komprenoble, pri kio vi pensis, forpelante vian serviston la tagon mem, dum kiu vi atendas la supozitan fianĉon de Fraŭlino? Vere, tio estas tro mal-sprita.

LAMBINET (*furioza*). — Fraŭlino Fanĉeto!... kion vi diris.....

FANĈETO. — Kaj vi kredas, ke oni ne povas ekkoleri.

S-ino LAMBINET (*Al ŝia edzo*). — Amiko mia.....

MARGARETO (*direktante sin al Fanĉeto*). — Fanĉeto.

FANĈETO. — Mi senĉese laboras, kiel ĉevalino, jam de la tagiĝo. Sufiĉas; mi deponas antaŭ vi mian antaŭtukon.

LAMBINET (*aparte*). — Diablo! (*laŭte*) Nu, Fanĉeto, mi estis malprava, mi tuj iros ĉe Ĉevet..... Aliparte, ni tre baldaŭ havos novan serviston, Berluron promesis al mi okupiĝi pri la afero..... Finu la purigadon de l'arĝentajo. (*Parolante al ŝia edzino kaj filino*) Tuŝante vin, iru ambaŭ ŝanĝi viajn vestaĵojn... mi tuj iros ĉe Ĉevet.

FANĈETO *residiĝas kaj daŭrigas sian purigadon.*

S-ino LAMBINET. — Iru, amiko mia.... Venu, Margareto. (*Margareto aliras al ŝi*).

MARGARETO (*al Lambinet, kiu survestas sian surtuton*).

— Almenaŭ, paĉjo, diru al mi, ĉu li estas blonda aŭ bruna?

LAMBINET. — Sed mi tute ne scias, ĉi mem vidos. Nu, rapidu, rapidu, mi tien flugas kaj revenas.

### SCENO II-A

FANĈETO (*sola kaj leviganta*)

Kiam oni pensas, ke ĉio tio okazas pro sinjoro, kiun oni neniam vidis, kiu elvenas el sia provinco por edziĝi tute same, kiel mi irus al la vendejo por aĉeti omaron. Vere, estas abomene vidi tiajn edziĝojn!... Nu, finita estas nun, mia argentajo. Pri la vespermanĝo mi devas okupiĝi. (*Oni sonoras.*) Ha! ne, mankis ankoraŭ la sonorado. (*Oni resonoras.*) Ha! la afero ŝajnas urĝa, bone, bone, oni venas, oni venas. (*Ŝi iras por malfermi kaj revenas kune kun Josefo; tiu ĉi estas tre bone vestita, multe da senĝeneco kaj multimemeco.*)

### SCENO III-A

FANĈETO, JOSEFO

JOSEFO. — Sinjoro Lambinet, mi petas?

FANĈETO. — Tie li loĝas, sed li eliris.

JOSEFO. — En tiuj kondiĉoj, mi atendos lin (*li sidiĝas apud la tableto*).

FANĈETO (*aparte*). — Li enseĝiĝas... li tute agas kiel ĉe li mem... ĉu estus...? (*laŭte*) S-ino Lambinet estas hejme... kaj se vi volas...

JOSEFO. — Ne, estas S-ro Lambinet, kun kiu mi deziras paroli.

FANĈETO. — Ĉu vi lin konas?

JOSEFO. — Ne, sed li scias, ke mi estas venonta.

FANĈETO (*aparte*). — Nenia dubo, estas la supozita fianĉo, li bone elrigardas... (*laŭte*) La sinjoro min pardonos, sed mi havas multe por fari. (*Ŝi aliras al la kameno.*)

JOSEFO. — Faru... faru...

FANĈETO (*donante al li ĵurnalon*). — Se la sinjoro deziras ĵurnalon...

JOSEFO. — Volonte, dankon.

FANĈETO (*aparte*). — Li estas tute plaĉanta. (*Salutante*) Sinjoro... (*Ŝi eliras sur la dekstra flanko, kunportante la tegilojn, kiujn oni metis sur seĝon, kaj la korbom, en kiu kuŝas la argentajo, sed ŝi lasas la viŝilon sur la tableto.*)

SCENO IV-A

JOSEFO (*sola, kun ĵurnalo en la mano*)

(*Levigante kaj ĉirkaŭrigardante*) Estas tute kiel oni antaŭanoncis al mi... agrabla larĝa hejmo... tute, kion mi bezonas. Tedis min, de longe, la provinco kaj la vivo en kastelo... mi provis ĉiuloke... mi servis altrangajn sinjorojn, ĉe artistoj, ĉe aktorinoj... mi bezonas ripozon kaj mi nun provos servi ĉe burĝoj. Nur la ĉefa afero konsistas akordigi kun S-ro Lambinet... Tre certe, Berluron parolis al li pri mi... nu, ĉu eble Lia Moŝto S-ro Lambinet ne revenos (*li sidiĝas sur la maldekstran apogseĝon kaj tuj releviĝas*) Ho! kio estas?... (*ekvidante la broson*) Ha!... (*li ĝin prenas, metas ĝin en sian poŝon kaj residiĝas*) Ni tralegu iom la ĵurnalon... kaj la valorkursojn de hieraŭ... ĉar mi jam posedas kelkajn valorojn... (*Legante la ĵurnalon*) Kontoro de Diskonto 744, Fervojaj Kompanioj Orléans 1341, Obligacioj de la Urbo de Paris jaro 1871-a 405, Lotbiletoj de Panamo 118 (*Eniras Lambinet, venante el la fundo*)...

SCENO V-A

JOSEFO, LAMBINET

LAMBINET (*aparte*). — Fanĉeto ĵus diris al mi, ke li estas tie. Ha! jen estas li...

JOSEFO (*daŭrigante*). — Banko de Turklando 722.

LAMBINET (*aparte*). — Li studas la kursojn de la valoroj... estas praktika homo.

JOSEFO (*daŭrigante*). — Zinko de Silesio.

LAMBINET (*interrompante lin*). — Sinjoro...

JOSEFO (*levigante kaj salutante*). — Sinjoro...

LAMBINET (*aparte*). — Li tute bone elrigardas.

JOSEFO (*aparte*). — Suŝĉe malbela li elŝajnas.

LAMBINET. — Tute ĉagrenata mi estas, ke vi devis atendi...

JOSEFO. — Ne grave estas, sinjoro, mi vin petas.

LAMBINET (*aparte*). — Kiel inteligenta kaj distingplena!

JOSEFO. — Mi venas al vi rekomendita de S-ro Berluron.

LAMBINET. — Mi scias... mi scias... li jam anoncis al mi vian alvenon al Parizo.... Ĉu vi faris bonan vojaĝon?

JOSEFO. — Sed, tre bona, sinjoro, tre bona. (*Aparte*) Almenaŭ li estas afabla.

LAMBINET. — Ĉu vi permesas, ke mi informiĝu pri la farto de sinjorino via patrino.... Mi ne havas ankoraŭ la honoron koni ŝin... sed mi scias, ke ŝi estas agrabla kaj ĉarmplena persono.

JOSEFO (*mirigita*). — Mia patrino... sed, ŝi tre bone fartas, mi dankas.

LAMBINET. — Des pli bone! des pli bone!

JOSEFO (*aparte*). — Li estas eĉ amikema.

LAMBINET (*proksimigante seĝon, kiun li prenis apud la tableto*). — Bonvolu sidiĝi.

JOSEFO (*rifuĝante*). — Sed, sinjoro....

LAMBINET (*insistante*). — Mi petas vin.

JOSEFO (*sidigante sur la maldekstran apogseĝon*). — Por plaĉi al vi, sinjoro. (*Aparte*) Kia strangulo!

LAMBINET (*kiu rigardis emocie Josefon, sidigas apud li sur seĝon*). — Nun, sinjoro, permesu, ke mi diru al vi la fundon de mia penso.

JOSEFO. — Diru, sinjoro, diru.

LAMBINET. — Vi scias, el kio konsistas la unua impresio. Oni troviĝas antaŭ persono, kiun oni ankoraŭ neniam vidis.... oni ricevas kvazaŭ pikon en la stomako, estas precize tiu piko, kiun mi nomas la unua impresio. Nu, vidante vin, mi tuj eksentis tiun feliĉigan trapikon.

JOSEFO. — Kredu ankaŭ, ke, miaparte, tiu kvazaŭ trapiko estis....

LAMBINET. — Vi multe plaĉas al mi, sed estas alia persono, al kiu vi devos plaĉi, estas mia filino. Ha! mi ne altrudos ŝin kaj ĉio dependos de ŝia alkonsento.

JOSEFO (*aparte*). — Ŝajnas al mi, ke tiu fraŭlineto regas la domon.... (*laŭte*) Tamen, mi esperas....

LAMBINET. — Jes, jes, esperu; aliparte mi faciligos al vi la aferon... mi aranĝos duopajn renkontiĝojn. En via situacio estas multe permesata.

JOSEFO (*aparte*). — Pro Dio! kion li diras!

LAMBINET. — Plie, mi scias, ke mi havas antaŭ mi bonmanieran homon, kiu ne trouzos la konfidon....

JOSEFO. — Ho, mi promesas al vi... mi promesas al vi. (*Aparte*) Granda Dio! kun kia homo mi interrilatas!

LAMBINET. — Mi ekprezentos vin al ŝi, sed, antaŭe, mi estas tre kontenta, babiladi kelkajn momentojn kun vi.

JOSEFO. — Ni babiladu, sinjoro, ni babiladu.

LAMBINET. — Ni lasu aparte la finanĉan flankon... mi



konas vian situacion... Viaparte, vi scias, kiom mi mon-donas.

JOSEFO. — Tute ne, sinjoro.

LAMBINET. — Kiel, Berluron ne diris al vi?

JOSEFO. — S-ro Berluron nenion diris al mi.

LAMBINET. — Li devus... mi pensis... Sed, ni ne parolu pri tio, mi petas. Mi abomenas diskuti monaferojn... Mi supozas, ke estas same kun vi....

JOSEFO. — Sinjoro, mi konfesas, ke...

LAMBINET. — Jes, pri tio mi estis certa. Vi vidis mian notarion... li ĉion al vi klarigos. Tio, kion mi donas, estas tre akceptebla, do, nenia malhelpaĵo sur tiu flanko.

JOSEFO (*mirigita*). — Mi vidis vian notarion.

LAMBINET (*preskaŭ kortuŝita*). — Jes, aranĝi monintere-sojn estas bone, sed, starigi facilajn kaj amemajn interrilatojn — jen estas la ĉefa afero... Tre certe, ni devos kunvivi, ĉar tre certe vi ne plu forlasos min.

JOSEFO. — Kompreneble.

LAMBINET. — Ĉu ni havas la samajn ideojn? Ha! tie kuŝas la tuta afero.

JOSEFO. — Jes, vi estas prava.

AMBAŬ (*ritme elparolantaj*). — Tie kuŝas la tuta afero.

LAMBINET (*leviĝante kaj puŝante la seĝon kontraŭ la tableto*). — Jen, kiamaniere mi vivas: naŭ monatojn en Pa-rizo kaj tri sur la marbordo... Ĉu tio konvenas al vi?

JOSEFO (*ankaŭ leviĝante*). — Perfekte.

LAMBINET. — Aliparte, se vi preferas resti unu mona-ton plie sur la marbordo.....

JOSEFO. — Tri monatoj ŝajnas al mi sufiĉa.

LAMBINET. — Ĉu vi naĝas?

JOSEFO. — Jes... ne tro malbone... mi naĝetas....

LAMBINET. — Pri mi, mi perfekte naĝas.... Vi vidis... vi restos mirigita.

JOSEFO (*aparte*). — Nu, neordinara konversacio.

LAMBINET. — Ni reparolu pri nia komuna vivmaniero.... Vi ŝatas la marbordon, vi naĝas... bone, ĉio aranĝigas por la somera sezono, sed restas la naŭ monatoj en Parizo. Ha! mi devas tuj konfesi al vi, mia granda pasio estas la teatro. Preskaŭ ĉiuvespere mi tien iras.

JOSEFO. — Tio devigos min kuŝiĝi iom pli malfrue, ta-men, mi konas mian devon... mi vin atendas.

LAMBINET. — Kiel? vi min atendas?... Ha, jes, mi

komprenas... vi restus sola kun mia filino (*li pugnobatas lin amike*).

JOSEFO. — Ho, sinjoro, ne pensu, ke...

LAMBINET. — Tute ne... Mi ne amas iri sola al la teatro... mi bezonas komuniki miajn impresojn, do, vi venos kun mi.

JOSEFO. — Mi ĉiam estos je via dispono.

LAMBINET. — Des pli bone... sed, ne estas ĉio; kiajn teatrojn vi preferas?

JOSEFO. — La teatrojn, kiujn mi preferas...

LAMBINET. — Pri mi, ekzistas nur du allogaĵoj, la vera ŝercplena prezentado kaj la dramo. Amuzas min ridi aŭ plori... la muziko agacas min kaj la tragedio dormigas min! Ĉu vi samopinias?

JOSEFO. — Absolute, sinjoro, absolute.

LAMBINET. — En tiuj kondiĉoj, frapu en mian manon, vi estas tiu, kiun mi deziris... Mi tuj venigos mian edzinon kaj filinon, kaj se vi interkonsentos kun ili, kiel ni jam interkonsentis, nia komuna feliĉo estas starigita, mi tuj iros serĉi ilin. (*Li eliras per la maldekstra flanko.*)

(*Daŭrigota.*)

Tradukis HENRI DE COPPET.

---

## ANEKDOTO

### Recepto kontraŭ cigaroj.

Kuracisto el Strasbourg, ricevis de germana firmo jenan leteron :

« Sinjoro,

« Vere estas, ke vi ne mendis al mi cigarojn. Tamen, mi permesas al mi sendi vin skatolon enhavantan 100 da ili; estante konvinkita, ke vi ĝustvalore ŝatos ilian aromon. Bonvolu trovi entenate, mian fakturon, kiu kalkulas 15 frankojn ».

Li trankvile fumis la cigarojn kaj poste respondis :

« Sinjoro,

« Vere estas, ke vi ne postulis de mi konsulton. Tamen, permesu al mi sendi vin, entenate, tri receptojn, ne dubante unu minuton, ke, ĝustatempe, vi utiligos ilin kaj ke vi estos tiel kontentigita per ili, kiel mi estis post la elfumado de viaj cigaroj. La prezo de miaj receptoj estante po 5 Markoj, ni, tiamaniere nenion ŝaldas unu kontraŭ la alia ».



N.-B. — La Rédaction de *La Dek-Sepa* désire acheter les Numéros suivants : N° 2 (Janvier 1911); N° 7 (Juin 1911); N° 12 (Janvier 1912); N° 13 (Février 1912); N° 14 (Mars 1912); N° 24 (Mars 1913).

---

## OUVRAGES de M. Henri de Coppet.

*En vente à la Rédaction de « La Dek-Sepa ».*

L'Esperanto appris sans maître en 15 leçons . . . . .	fr. 4,50
Recueil de phrases, édition Française-Esperanto, plus de 2800 phrases de la vie usuelle . . . . .	fr. 4,80
L'Espero, hymne espérantiste de D-ro L. L. Zamenhof, édition pour tenor ou soprano . . . . .	fr. 4,50

---

## LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la ag-  
atakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato.

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al  
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

---

La plej malnova el ĉiuj gazetoj Esperantistaj  
FONDITA EN 1895

# LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTOJ

Ĉefredaktoro : TH. CART.

40 + 8 paĝoj. — Aperas regule ĉiumonate.

Jara abono : 5 fr. (2 S). — Unu numero : 0 fr. 50 (0 S 200).  
Por ricevi specimenon oni sendu unu respondkuponon.

LINGVO INTERNACIA kaj JUNA ESPERANTISTO  
kombinita abono : 7 fr. (2 S 800).

**PRESA ESPERANTISTA SOCIETO**  
33, rue Lacépède -:- Paris



*Vera.*  
**Ferhava Salo**  
**alsimiligobla**

ELTROVITA DE

**M. Maurice ROBIN**

en 1881.

LA

**Fer Robin**

*mirinde efikas*

KONTRAŬ

**SENSANGECO,**  
**PALKOLORECO,**  
**SANGELFLUOJ**  
**ĈIUSPECAJ**

Akcelas la nutrandon kaj  
 neniam mallaksigas.

Tiun ĉi kuracilon, absolute sengusta, oni uzas laŭ la dozo de 10 ĝis 30 gutoj ĉe ĉiu mango, ĉu en iom da akvo aŭ vino. La enhavo de la boteleto reprezentas la daŭron de tri semajnoj ĝis unu monato da kuracado.

Por eviti la falsajojn  
**POSTULU** la **ROBIN**  
 nomon de

VENDEJO POGRANDE:  
**13, Rue de Polssy, PARIS**

Imprimerie Espérantiste V. Polgar, 33, rue Lacépède, Paris.

Le Gérant : L. DESPRÈS